

La Espero

Svenska Esperantotidningen

1973-6

Fondita en 1913

Ni kongresos en Borlänge 1974

KIEL NI JAM INFORMIS LA JARKONGRESO DE LA SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO 1974 OKAZOS EN BORLÄNGE DUM LA PENTEKOSTO, 1-3 DE JUNIO

Borlänge situas en la centro de Dalekarlio, nia fama turista provinco, tre proksime kaj al la bela kaj tradicia regiono de lago Siljan kaj al la malnova urbo Falun kun ĝia kupra minejo. La dalekarlia pejzaĝo certe montros sian tutan ĉarmon dum tiuj unuaj tagoj de nia plej bela somera monato, kaj perfekte belan veteron jam promesas niaj dalekarliaj gesamideanoj.

Aperos en proksima numero pli ampleksa artikolo pri Borlänge kaj pri la provinco, kaj aperos ankaŭ pli detalaj informoj pri programo kaj prezoj. Jam nun ni tamen volas informi pri kelkaj ĉefpunktoj:

Kongresejo:

Hotelo Brage en Borlänge, kie okazos ĉiuj kunvenoj kaj kie ankaŭ la plej multaj povos loĝi.

Ekskurso:

En la posttagmezo de la pentekosta dimanĉo startos aŭtobusoj por Insjön (diservo en la preĝejo de Al, tiuj kiuj ne deziras partopreni la di-

servon povos promeni en la belaj kaj interesaj ĉirkaŭaĵoj), kaftrinkado en iu konvena ejo kaj eble ankaŭ vizito al la teksejo Masen en Insjön. Poste la aŭtobusoj daŭrigos al Siljansnäs kie — en hotelo Siljansnäs — okazos komuna supeo kaj distra vespero. Nokta reveturo al Borlänge. La planoj estas provizoraj kaj ŝanĝoj povas ankoraŭ okazi.

La laborkunsidoj

okazos en la antaŭtagmezo de la pentekosta tago (la jarkunveno de SET) kaj en pentekosta lundo (jarkunveno de Eldona Societo, fakaj kunsidoj, parolado de gastpreleganto, diskutoj). La jarkongreson finos komuna lunĉo.

Adreso de LJK:

S-ro Erik Lundvall (aŭ Esperanto-kongresen), Grådavägen 36, 781 00 Borlänge, tel. 0243-256 35.

Pluaj informoj sekvos. Sed rezervigu jam nun la pentekostajn tagojn por interesaj esperantoaranĝoj en unu el la plej belaj regionoj de la mondo!



Rimarkoj pri la laborplano de UEA

En la informo pri la Laborplano de UEA, publikigita en la n-ro 5/1973 de "La Espero", estas dirite, ke "malgraŭ forta kontraŭstaro de la estraro de UEA, la komitato kun granda plimulto akceptis la Laborplanon (kun kelkaj modifoj)."

Bedaŭrinde, pro kaŭzoj tute ekster mia kontrolo, mi ne povis partopreni en la laboroj de la UK en Beograd, kaj sekve ne scias, ĉu efektive estis ia "granda kontraŭstaro". Sajnas, ke eĉ rilate la akcepton de la Laborplano en la Komitato regas sufiĉe da konfuzo: Ulla Luin asertas, ke la Komitato decidis revizi ĝin "post du-tri jaroj"; la Komisiono mem proponis, ke ĝi "validu por periodo de du jaroj"; pluraj ĉeestintaj komitatanoj asertis, ke ĝi validos unu jaron. La malneto de la protokolo de la kunsidoj ne klarigas la aferon. Stranga plia konfuzo pri tiel gravega dokumento, kiu mem akcentas la neceson de "pli forta interna disciplino".

La fakto estas, ke la Estraro, dum sia printempa kunsido (1973), unuanime trovis, "ke la propono de la Komisiono ne estas adekvata kaj ne formas taŭgan bazon por diskuto en la Komitato", sed, kompreneble, lasis la finanĉan decidon al la Komitato. La fakto ankaŭ estas, ke la Komitato akceptis la projekton, sed forigis el ĝi almenaŭ la plej fatalajn erarojn, ekzemple ke la Jarlibro aperu ĉiun trian jaron.

Nu, se sep estraranoj, pri kiuj oni devas almenaŭ supozi, ke ili havas la necesan mondvastan superrigardon pri faktoj kaj eblecoj, trovis tiaspecan projekton maladekvata, dum la plimulto en la Komitato akceptis ĝin, signifas, ke io estas grave malĝusta.

Ne dezirante paroli en la nomo de la tuta Estraro, eĉ ne kiel prezidanto de UEA, mi esprimas ĉi tie plej koncize nur mian personan opinion.

La projekton de la nova Laborplano mi trovis neadekvata el enhava, sistema kaj procedura vidpunktoj.

Enhavo

Laŭ sia enhavo la projekto, nun Laborplano, estas senperspektiva. Kiel bazon necesis preni en konsideron la nuntempajn ekonomiajn kaj politikajn internaciajn rilatojn, la faktan pozicion kaj pretendojn de la t.n. grandaj lingvoj en la mondaj kaj regionaj institucioj, kiel ankaŭ en la internacia praktiko, la lingvaj kaj ĝenerale kulturajn ofensivojn kaj kontraŭofensivojn; necesis lokigi la Internacian Lingvon en tiun realaĵon, emfazi la rolon de la Esperanto-organizaĵoj, prezenti la vojojn por elludi la antagonismojn kaj por altiri ĉiujn pozitivajn fortojn, kiuj havas inter-

naciajn kontaktojn kaj celas internacian komprenigon, al la solvo por kiu ni pledas. Tio devis esti la elirpunkto de vere nova Laborprogramo. El ĝi devis fondi la maksimumaj kaj minimumaj atingotaj celoj, la konkretaj taskoj kaj rimedoj por la realigo de la tuto ne en 1, 2 aŭ 3 jaroj, sed dum nedefinita periodo, ĉar tian karakteron necese havas kiu ajn perspektiva programo de socia-kultura organizaĵo kiel UEA (pli detale pri tio en la julia-aŭgusta n-ro de "Esperanto", 1973). Tia programo, konforma al la nuntempaj bezonoj, estus ne nur solida baza dokumento de niaj agadoj sur diversaj niveloj, sed ankaŭ inspira instrumento de kuraĝigo kaj mobilizo de ĉiuj niaj fortoj. En la nuna plano tio forestas, kvankam, sendube, en ĝi troviĝas utilaj partoj prenitaj laŭvorte el la Dua Baza Laborplano, kelkaj el la sugestoj de la kunveno en Frostavallen (1972) kaj ankaŭ 2-3 aliaj pripensindaj ideoj.

Tiom, tute principe, rilate la enhavon. Mankas la spaco por pritrakti multnombrajn tre dubindajn erojn aŭ gravajn ellasojn. Nur kelkaj estu menciitaj: restas tute malklara la distingo inter "uzantoj" kaj "agantoj"; se por iuj ĝi estas klara, nenio estas dirita kiajn rezultojn, aldone al la konataj "povus doni diversaj esploroj kaj analizoj" pri bezonoj de la du grupoj (cetere, kiu faros la esplorojn, laŭ kiuj metodoj, per kiuj financaj rimedoj, ktp.); nenio estas dirita pri la maksimumaj kaj minimumaj celoj; kvankam la komisiono asertas, ke ĝi prenis kiel bazon por ellaboro de la projekto ankaŭ la konkludojn de la kunvenoj en Frostavallen, tamen pluraj tre utilaj sugestoj ne estas prenitaj en konsideron, ekzemple la integriĝo de TEJO kaj detaloj pri formado de junularaj sekcioj en la lokaj grupoj, modernigo kaj vivigo de la lokaj societoj, ilia rolo en la nuna periodo; multe pli detala pritrakto de regionaj agadoj kun aparta atento al Eŭropo; pritrakto de la taskoj de la fakaj asocioj, pro ilia kreskanta graveco, disde la taskoj de LA kaj lokaj societoj; forestas sekcio pri la taskoj de unuopuloj, precipe de la delegitoj kaj fakdelegitoj, ktp.

Sistemo

Ankaŭ la sistemo estas neadekvata. Multaj eroj, kiuj aperas kiel taskoj de la centraj organoj, devus fakte troviĝi en la partoj, kiuj rilatas al la LA, ekzemple: iniciati la kategorion de "interesitoj", tradukoj el naciaj literaturoj, havigo de mono el naciaj publikaj kasoj, eldonado de nacilingva revuo, agadoj en naciaj parlamentoj, starigo de parlamentaj

grupoj, naciaj esplorkomisionoj pri la internacia lingvo-problemo (kial ne pri la enlandaj lingvaj problemoj?), k. a. La samon oni povus diri pri pluraj taskoj, kiujn tute certe kapablas pli bone plenumi la fakaj asocioj ol la centraj organoj de UEA.

Proceduro

Jen kelkaj el pluraj principaj eraroj el procedura vidpunkto. La Komisiono de 5 membroj, elektita en Londono (1971), dum unu tuta jaro faris absolute nenion: ĝi eĉ ne estis kontaktita. El la 5 membroj, 2 tute "ne havis la okazon partopreni la finanĉan ellaboron de la projekto". Ambaŭ faktoj estas ne tre inspiraj ekzemploj por la membraro, kiun la projekto (plano) alvokas al pli forta interna disciplino, "tiel ke ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto de la Asocio plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn". Plue, la Estraro de UEA — preskaŭ nekredeble — tute ne estis konsultita: la projekto estis rekte sendita al la Komitato fine de januaro. Malgraŭ tiu eraro, mi per cirkulero tuj petis la komitatanojn komenti, sed ĝis la kongreso venis absolute neniam reago. Al la projekto neniam estis aldonita la promesita modelo de laborplano de LA. La projekto neniam estis prezentita en tuteca formo, prespreta, sed en formo de aldonoj, forstrekoj, ŝanĝoj k.s. en la Dua Baza Laborplano (eĉ nun, fine de oktobro, la plano ankoraŭ ne estas redaktita, ĉar, anstataŭ ŝanĝi la Komisionon pri tiu laboro, la Estraro ŝarĝis pri ĝi la supersarĝitan direktoron de la C. O.). Versajne tio kaŭzis la nereagon de la komitatanoj: por komenti ili ja devus studi, temporabe, almenaŭ tri longajn dokumentojn: la projekton, la Duan Laborplanon kaj la konkludojn de Frostavallen. Estas ege dubinde ĉu antaŭ Beograd aŭ en Beograd mem ĉiuj komitatanoj povis iel orientiĝi en tiu neordigita materialo. Diference de la projektoj de la du antaŭaj bazaj programoj, kiuj estis publikigitaj en la revuo "Esperanto" kaj submetitaj al publika diskuto por eventualaj amendoj, tiu ĉi projekto neniam estis presita en la organo de la Asocio, ĉar la Komisiono eĉ ne venis al la ideo prizorgi tion. Sekve, la membraro estis senigita de esence grava demokrata rajto. Post la 25-jara sistema demokratiĝado kaj organiza fortikigado de UEA, tio estas granda retropaŝo. La diversaj sugestoj publikigitaj en "Esperanto" kaj en kelkaj aliaj periodaĵoj, estis faritaj en vakuo kaj tial ne povis anstataŭi konkretajn proponojn surbaze de konkreta projekto.

Tiuj ĉi proceduraj eraroj sendube kontribuis al la multnombraj mankoj rilate la enhavon kaj sistemon.

Mi deziras forte emfazi, ke la supraj amikaj kritikaj rimarkoj ne riel tuŝas la personan estimon, kiun mi plu konservas por la membroj de la Komisiono. Plej kredeble, la tasko, kiun ili prenis sur sin, ne su-



Partoprenantoj de la Internaciaj Kursoj en Elsinoro 1973.
Vidu la artikolon en n-ro 5/1973.



ORO KAJ HONORO AL SVEDA SAMIDEANO

Okaze de la Internacia Speleologia kongreso en Olomouc, Ĉeĥoslovakio, kiu koincidis kun la 400-jara jubileo de la Universitato en urbo Olomouc, la Universitato honorigis s-ron **Leander Tell**, Norrköping, per la granda Ora medalo kaj diplomo de la Universitato.

Ĉi tiun distingon nia samideano ricevis pro sia meritplena agado internacia en la speleologio, i. a. pro la dekjara eldonado de "Arkivo por sveda grot-esplorado". Ĉi sciencaj katalogoj aperas ĉiujare kun novaj informoj pri la situo, naturo kaj historio de la svedlandaj grtoj, en sveda lingvo k. resumo en angla, esperanta franca k. germana lingvoj.

T. M.

fiĉe konsciaj pri ĝia amplekso, multe transpasis iliajn konojn de faktoj, personajn spertojn rilate ellaboron de perspektiva programo kaj ankaŭ aliajn antaŭkondiĉojn, inkluzive la eblecon de personaj kontaktoj.

La laboro, tamen, ne estis tute vana, ĉar tiu dujara atendado de la nova plano (kaj same longa perdo de tre valora tempo) estas tre instrua por ĉiuj, kiuj pretas lerni el la faritaj eraroj kun la celo eviti ilin en la estonteco. Espereble tiel okazos. Se ne, oni povas antaŭvidi kun sufiĉe da certeco danĝeran kaj rapidan retroiron, minacantan la detruon de ĉio pene atingita kaj anarkian malintegriĝon en periodo, kiam organiza kaj ideo unueco en diverseco estas pli ol iam necesaj por plua konstruado, por la plua disvastigo de la lingvo surbaze de la ĝisnunaj atingoj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

KONGRESO ESPERANTA EN SKELLEFTEA?

La gazeto Norra Västerbotten skribis la 6 de oktobro ke la urbon ĵus vizitint reprezentantoj de la sveda fervojista esperantoasocio. Oni esploris la eblecojn aranĝi la internacian kongreson de la esperantistaj fervojistoj en Skellefteå en 1976. (La kongreso 1974 okazos en Tarragona en Hispanio.)

PRENUMERERA

FÖR 1974 PÅ

ESPERANTO-TIDNINGAR

Heroldo	39:—
Kontaktö	16:—
Oomoto	13:—
Norda Prismo	17:—
Sennaciulo	26:—
Kulturaj Kajeroj	12:—
Literatura Foiro	13:—

Ingen moms på dessa priser. UEA:s tidskrift "Esperanto" får man genom medlemskap i UEA och "La Espero" genom Svenska Esperanto-förbundet. Förlaget förmedlar abonnemang även på andra Esperantotidningar men kan inte ta ansvar för att dessa levereras.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

Redaktoro:

Jen do la lasta numero de La Espero por la jaro 1973. Ni komencis la jaron kun nova aspekto kaj kun multaj bonaj intencoj. Kelkajn el ili ni realigis, multajn tamen ne. Bedaŭrinde ofte mankas tempo kaj forto por realigiti, kion oni plej deziras. Ni streĉu la fortojn ankoraŭ pli dum 1974 por krei interesan kaj valoran gazeton. Kunhelpu vi — per sugestoj, raportoj, artikoletoj!

En tiu ĉi numero vi trovos kvar paĝojn kiujn eldonis SEF okaze de la 25-jara datreveno de la akcepto de la deklaro pri la homaj rajtoj. Estas memklare ke internacia organizaĵo kiel la esperantomovado atentas pri tiu jubileo. Estas ankaŭ tute nature, ke ni atentigas speciale pri tiu kampo en kiu ni mem laboras, la lingva problemo.

La esperantomovado estas neŭtrala el politika kaj religia vidpunktoj. Sed kompreneble ni ne estas neŭtralaj kiam temas pri lingvaj problemoj. Ni ja proponas solvon, ni havas solvon! La baza ideo de la aldonita dokumento de SEF, ke la lingva demando estas demando pri egaleco, estas certe argumento, kiun ni devas pli emfazi dum nia agado en la estonteco.

En Svedujo homoj ĝenerale ne konscias pri tiu flanko de la problemo. Estas nia tasko vekti atenton pri ĝi — kaj konigi nian solvon. Kaj ni turnu nin antaŭ ĉio al la junularo — al tiu junularo, kiu estas konscia pri la grandaj problemoj de la moderna mondo!

En la antaŭa numero ni publikigis artikolon de Ulla Luin pri la laborplano de UEA. La prezidanto de UEA verkis artikolon, kiun vi trovos en tiu ĉi numero, en kiu li faras kelkajn klarigojn kaj prezentas siajn vidpunktojn. La temo estas ege grava kaj ambaŭ artikoloj meritas, ke vi legu ilin kaj zorge konsideru la enhavon. Ni esperu, tamen, ke ni baldaŭ povos legi la kompletan tekston de la laborplano.

Guillaume, Cicanti, Manani, jen la nomoj de tri eminentaj prelegistoj kiuj veturis tra Svedujo dum la aŭtuno. La veturojn de la du unuaj organizis SEF, tiujn de la tria ges. Aberg en Göteborg. Pro diversaj kaŭzoj la raportoj pri tiuj prelegvojaĝoj aperos nur en la sekvonta numero.

Feliĉan novan jaron al vi!

Arvid Blomberg

Sukcesa postkongreso en la metropolo Greka

La Oficiala Postkongreso en Ateno, la greka ĉefurbo, allogis pli ol 300 partoprenantojn el ĉiuj partoj de l'mondo kaj ĝi fariĝis granda sukceso dank' al la bonegaj arangoj kaj fervora laboro de la grekaj esperantistoj.

La skandinavan grupon, al kiu mi apartenis, gvidis gesinjoroj Gustav kaj Bodil Kühlmann, Kopenhago, konataj kaj ŝatataj gvidantoj de multaj antaŭaj kongresvojaĝoj. Ili atente gardis sian "gregon" por ke neniu el la "ŝafoj" (danaj, islandaj, svedaj) perdiĝu dumvoje.

La nova moderna Studenta Domo estis nia hejmo dum la kongresa semajno kaj ĝi ankaŭ servis kiel kongresejo. Laŭlonge de Isu-strato, kie la Domo situas, flirtis grekaj kaj esperantaj flagoj kaj super la strato pendis banderolo kun la vortoj "Estu kore bonvenaj". Kaj kiel karaj, bonvenaj gastoj ni sentis nin ek de la unua momento sur greka tero.

En la Malferma Kunveno la grekaj esperantistoj esprimis sian grandan gojon, ke oni povis aranĝi la Postkongreson en Ateno, kaj deziris al la kongresanoj agrablan restadon tie.

Varia, enhavoriĉa estis la kongresa programo: interesaj prelegoj, rondveturoj en la urbo, tuttagaj ekskursoj kaj amuzaj vesperaj arangoj.

Ateno, tre alloga celo de ĉiulandaj turistoj, ankaŭ ravis nin pro sia ĉarmo kaj beleco, siaj artaj trezoroj kaj unikaj vidindaĵoj.

Ni vagis inter la monumentoj kaj restaĵoj de Akropolis, kies verto estas kronita de la majesta Parthenon-templo.

Ni travivis veran grekan atmosferon en Plaka, la malnova kvartalo, kie muziko, kantoj, originalaj dancoj agrable nin distris.

Ni ĝuis la stimulan vivon en stratoj kaj placoj, la turkan kafon, la grekan vinon, kaj sentis nin tre feliĉaj, senzorgaj, sub la serena greka ĉielo.

"Mirakle, ke la suno brilas ĉiutage", diris Gudrun el Reykjavik. "Hejme plej ofte estas nebulo kaj pluvo."

Ateno, kiu inkluzive la havenurbon Pireus havas 2 milionojn da loĝantoj, bele situas ĉe Saronika golfo. Ni iutage veturis laŭ la Attika Riviero, kie etendiĝas kilometrolongaj bordoj kaj plaĝoj por rigardi la Poseidon-templon en Sounion, la plej suda pinto de l'Attika provinco.

Sur alta roko staras la templaj

ruinoj, 9 doraj kolonoj, kaj estas grandioza spektaklo de tie admirati la sunsubiron.

Memorinda estas la tuttaga ekskurso al Korint, Mykene kaj aliaj famaj lokoj en Peleponnesos. Ni sekvis unu el la plej belaj vojoj en Greklando, jen ĉe la maro, jen sur montdeklivo, ĝuante la vidaĵon de golfoj kaj insuloj. Ni paŭzis ĉe la Korinta Kanalo, planita jam dum antikva epoko sed nur en novtempo konstruita kaj preta por trafiko en la jaro 1895.

Transpasante la kanalan ponton ni daŭrigis al Malnova Korint kun restaĵoj kaj monumentoj el diversaj epokoj kaj muzeo kun romaj trovajoj. Sur teraso levigas la templo de Apollo el la 6-a jarcento a.K. kun potencaj doraj kolonoj.

Ni veturis pluen al Mykene trans la fekundan ebenaĵon de Argolis, kie etendiĝas vastaj kampoj de kotono, vinberoj kaj kulturejoj de ĉiaj dolĉaj fruktoj.

Mykene! Magie soras al la oreloj tiu nomo kaj fabelo, mistiko envolvas tiun lokon antikvan.

En la jaro 1878 Heinrich Schliemann tie trovis la fantazian "Oran Trezoron", arta kolekto de oraj objektoj, kiujn oni nun povas pririgardi en Nacia Muzeo en Ateno. Bedaŭrinde restas nur ruinoj el la palaco de Agamemnon, sed lia tombo estas konservita same kiel la impona Leona Pordo, tra kiu oni eniras al la ruina kampo.

Ni tagmanĝis en Nauplion, ĉarma urbo ĉe blua golfo, kaj ĉe la tablo kie mi sidis, ni estis 6 personoj el 6 diversaj nacioj. Neniu enuis en tiu rondo!

Lasta haltejo dum la interesa eks-


kurso estis Epidaŭros, situanta en monta, arboriĉa pejzaĝo. Tie troviĝas tre fama amfiteatro el la 4-a jarcento a.K. kun eksterordinara akustiko kaj sidlokoj por 15.000 personoj. Ĉiusemre la Greka Nacia Teatro tie prezentas grekajn tragediojn. Neforgesebla estas la ŝipekskurso al Egina, Poros kaj Hydra. La ĉielo volbiĝis kiel blua vitra globo super Egea Maro, tra kies sunbrilaj ondoj fiere glitis "Marina", nia blanka ŝipo.

Hydra estas tre pitoreska insulo kaj ŝatata restadejo de artistoj el ĉiuj partoj de l'mondo. La dometoj alkruciĝas al la rokoj kiel birdaj nestoj kaj kaskadoj de multkoloraj floroj kovras la blankajn murojn.

Ĉe la haveno regas vigla kaj miksitita vivo. Amaso da butikoj tentas pri ĉiuspecaj varoj kaj la restoraciaj menuoj allogas per delikataj grekaj specialaĵoj. Sed ni, kongresanoj, bone tagmanĝis sursipe, tuj kiam "Marina" forlasis la havenon de Hydra.

Egina estas konata ne nur pro sia naturbeleco sed ankaŭ pro grandioza monumento el la 5-a jarcento a.K., la Templo de Afaria. Ĝi staras sur monteto kaj estas agrable ekiri tien sur azena dorso. La ĉarma besto persiste trovas supren laŭ mallargaj vojetoj, borderitaj de pinioj odorantaj. Kaj atinginte la celon oni ĝuas ne nur la vidaĵon de monumento el glora pasinto sed ankaŭ mirindan panoramon de rokoj kaj maro.

Ekster la programo oni aranĝis ekskurson al Delfi por tiuj, kiuj deziris viziti tiun belegan lokon sur deklivo de la monto Parnassos. Parto de la kongresanoj preferis ripozi aŭ ĝui ĉe la marbordo, dum aliaj "in-



Ateno — la Pordo de Hadriano.

(Bildo: Heroldo)

Se legemo ekestas

KIT VIVAS. Jytte Lyngbirk.

Tradukis el la dana Gudrun Riisberg. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj 1973. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, 26:60 inkl. imposto.

La dana eldonejo trovis ne malpli ol perlon.

Jytte Lyngbirk verkis prozan ampoemon pri la malnova kara temo: viro renkontas virinon. Sed la medio estas nia nuntempa junularo, kaj la verkistino skizas fonon el cirkonstancoj kaj problemoj nur tro aktualaj: distanco kaj nekomprenejo inter la generacioj, malemeco, narkotajo. Tamen ŝi ne lasas tiajn aferojn domini. La ĉefa fadeno, la forta fluo tra la tuta rakonto estas la tenero, tenero kiu superregas eĉ la karnan deziron kaj la konstante minacantan katastrofon.

La tradukon faris Gudrun Riisberg. Kvankam ne konante la danan originalon oni kuraĝas la supozon ke ŝi tre zorge redonis ĝin. La esperanta teksto fluas nature kaj klare, kvankam tradukaj problemoj kredeble ne mankis. Eble iuj gramatikistoj metus demandsignon kelkajn fojojn eĉ la uzo de 'kia' (anstataŭ 'kiel').

Nur kelkajn etajn preserarojn mi trovis. Veraj neologismoj preskaŭ forestas, kaj el la dekdu klarigitaj vortoj minimume la duonon oni tamen senĝene komprenus.

Do, sume, bona kaj bela kontribuo al nia literaturo.

Ake Ahlérn

vadis" la urbajn magazenojn por elĉerpi restantajn drakmojn.

En la 24-etaĝa Atena Turo okazis vespere Oficiala Akcepto fare de la Ministerio de Civilizacio. En tiu luksa medio kun delikataj flordekoracioj kaj plaŭdanta fontano la gastoj ŝajne sentis sin tre bone, la vikingoj el Nordo, la "pupoj" el Nippon kaj la samideanoj el Brazilo kaj Meksikio. Oni mangis, trinkis, vikle konversaciis kaj intertempe admiris la grandiozan panoramon de Ateno kun miriadoj da lumoj brilantaj.

Kun pezaj valizoj sed malplenaj monujoj ni skandinavoj en la venonta tago suriris la aeroplanon, kiu portos nin hejmen. Jen sin levas la giganta birdo. Malaperas Ateno, la montoj, la maro.

Sed restos por ĉiam la memoro pri sukcesa Postkongreso en la unika kaj bela ĉefurbo de Greklando.

Ella Nilson

VENEZUELA STELO

Organo de la Esperantomovado en Venezuelo. Presita. La estraro de la Venezuela Esperanto-Asocio decidis reorganizi la movadon disĉonante al ĉiu membro de la estraro difinitan taskon.

ESTO

Organo por Esperanto-Stockholm. Ĉefa enhavo: estontaj programoj. Osvald Nicolaisen, kiu faris mondvojaĝon, rakontis je du okazoj pri Azio kaj pri Okcidenta Afriko kaj Norda Ameriko, ambaŭfoje kun lumbildoj. Nova ejo: Tideliugatan 23. Kunveno ĉiun mekredon je la 19 horo.

LA TORNISTRO

Literatura jarkajero eldonita de Argentina Esperanto-Instituto. 50-paĝa, kun varia, interesa enhavo. Bonaj desegnaĵoj.

INTERNACIA FERVOJISTO

Unu el la plej interesaj fakaj esperantorevuoj. Atingas nin regule. Tre varia enhavo kun ofte interesaj artikoloj. Ekzemple en nro 4/1973 estas artikolo pri la danaj fervojoj, DSB, kiel ŝipkompanio, montrante la apartajn cirkonstancojn de la fervojoj en la insula lando Danlando.

NORVEGA ESPERANTISTO

Atingas nin ankaŭ regule. Serĉas novan redaktoron anstataŭ Hans Amund Rosbach kiu provizore funkcias. Tiu revuo havas sub la rubriko "Norvega Rubriko" mallongajn raportojn el la vivo de la diversaj kluboj, tiajn kiajn petis de ni multaj legantoj. La problemoj por La Espero tamen estas ke ni nur aŭdas pri la deziroj de la legantoj havi tiajn raportojn, sed neniu agas. Ekzemple ĵus nun troviĝas sur la tablo de la redaktoro eĉ ne unu raporto pri la agado de iu ajn klubo sveda!

NOVA INFORMORGANO EN HUNGARIO

Hungara Esperanto-Asocio havis, kiel preskaŭ ĉiu nacia esperantoorganizaĵo, sian dulingvan, ne tro belaspektan internan informorganon, kiu apenaŭ vekis entuziasmon ene de la movado kaj certe ne ekster.

Ek de oktobro 1973 oni elektis alian vojon en Hungario. Oni aperigas ĉiun duan monaton hungarlingvan revuon, "Esperantó magazin", kiu servu kiel informilo pri la monda lingvo-problemo kaj pri esperanto. Ĝi aperas nun en 10.000 ekzempleroj. Laŭ mi ekzistas nur unu alia simila eksperimento lanĉita de esperantoorganizaĵo, nome "Ejo" en Danlando. Sed kompari la danan revuon kun nur resumoj en la dana lingvo kaj kies enhavo neniel estas kontentiga por ekstera publiko kun la tute profesia kaj laŭenhave kaj laŭaspekte luksa legu: 'komparebla al kiu ajn nacilingva' revuo estus sakraĵo.

La ĉefartikolo en la unua numero temas pri "La multlingveco kaj nia epoko". Tiu serioza titolo donas bonan impreson pri la stilo de la tuta revuo, kiu pritraktas la lingvan pro-

blemon el multaj aspektoj. Kelkaj el la rubrikaj tekstas jene: "Gepatra lingvo de la egalrajteco", "Konferenco pri interlingvo en Moskvo", "Lingvaj problemoj de la spacveturado". Diversajn flankojn de esperanto oni ankaŭ prezentas per raporto ampleksa el la UK en Beograd, per traduko el "Infana raso" de W. Auld, kaj per esperanta lingvo-kurso. Du paĝoj kun raporto pri la agado en la hungara movado aperas en esperanto.

La ekstera formo de la revuo estas jam konata al la legantoj de la kulturrevuo "Hungara vivo". Do, la tipografio estas imitinda.

Sendube tiu ĉi eksperimento estas interesa kaj indas sekvi ĝin por ion lerni, ĉu oni eventuale povus trovi rimedojn, ideojn kaj fortojn por lanĉi similan, regulan informilon ankaŭ en aliaj landoj. Unuamomente ni povas nur gratuli al Hungara Esperanto-Asocio!

Tomas Jansson

MODERNULO

*Vi sidas en moderna aŭto.
Vi lerteapable majstras ĝin.
Vi oftokupis flugmaŝinon
portanta vin ĝis mondojn.
Vi scias multajn melodiojn.
kolektis ilin sur sonbend'
Vi konas ĝiajn teĥnikojn,
kreitajn sub la firmament.*

*La konto sur la banko kreskis.
Monzrroj preterivas vin.
Vi ankaŭ konas amuzejojn,
kien vin logis belvirin!
La pezlaboron vi ne ŝatas.
Vin interesas monogajn',
profito estas via celo!
Por vi ne gravas, kia ajn ...*

*En via korpo batas koro,
sed mankas al ĝi nur konsci'.
Nemiam helpis vi najbaron,
La mondo demandis: Kiel statas vi? —
La mondo ŝajnas nur la via.
Nur propra estu la bonfari'.
Ne tuŝas vin alies sorto,
ies amiko vivostari'.*

*Ne konas vi la birdan kanton'
nek la aspekton de pavu'.
Kaj pri la arbo vi nur scias:
por aŭto kaŭzas ĝi detru',
Kaj super via tombo pepos
pasero, gaja pensemul'.
Ĉi sube kuŝas nun trankevide,
ne homo, sole obstinul'!*

Rudolf Zimmermann

La poemo ĉi-supre eble ne estas poeta majstraĵo. Ĝi ne pretendas esti. Generale ni ne publikigas poemojn diletante faritajn. Tro da esperantistoj havas la emon formi siajn pensojn rime. Kaj imagas al si ke ili tion kapablas. Sed la ĉi-supra poemo de orientgermana samideano instigas al pensado. Eble ĝi ŝajnas al vi naiva. Sed kial? Ĉu ĝi ne tamen esprimas la veron?

Le Redaktoro

AŬTUNO ESTAS

MIRAIL SEKERGIEV

Ekzistas iu tenereco en la aŭtuno. Buntaj koloroj kovras la korpon de la montaro, kaj la arbaro brulas en incendioj. Flavaj arbofolioj surteriĝas malrapide kvazaŭ per paraŝutoj kaj kantas sub viaj paŝoj. Iu mola silenteco karesas vin kaj igas vin mediti. Tiam miloj da pensoj trapasas vian konscion — pensoj pri la vivo, pri la juneco, pri la maljuneco. Kial ĉio en la mondo estas tiel efemera? Estas klare: iun tagon ankaŭ vi samkiel aŭtuna folio deŝiriĝos de la homa arbo kaj forpasos en la malekziston. Tiam via koro, seninterrompe batinta ekde via naskiĝo ĉesos bati, kaj viaj sentoj, donintaj al vi tiom da emocioj, ĉesos funkcii. Ĉar la vivo estas ĝojo kaj sufero, tago kaj nokto, printempo kaj aŭtuno.

Vidu kiel la arbofolioj krispiĝas, vidu kiel la haŭto de la maljunuloj estiĝas maldika, seka kaj flavebruna, similanta antikvan papiruson sur kiu estas skribita la saĝeco de la vivo.

— Pri kio vi pensas, avo? mi demandas la maljunulon sidantan sur la benko.

— Mi nombras miajn plagojn kaj suferojn kaj aldonas al ili miajn ĝojojn kaj feliĉon — respondas la maljunulo.

Poste metante manon sur sian kordon kaj sen rigardi min, daŭrigas:

— Memoru filo mia: strebu havi grandan animon kaj ami la homojn. Iun tagon vin englutos ne nur la tero, sed ankaŭ la forgeso kaj neniu

rememoras pri vi.

Aŭtuno estas. Iufoje pluvas. La gutoj frapas la fenestron, glitas mal-supren sur la vitroj kaj malaperas. Ĉu ne tiel naskiĝis kaj malaperis dum mia vivo miaj revoj kaj deziroj?

Sed jen, la pluvo ĉesas. Mi rapidas eksteren por spiri la refreŝigitan aeron. En la parko la pluvo kotigis la vojetojn kaj la koto malpurigas miajn ŝuojn, mian pantalonon. Ho, tiu ĉi koto, sinonimo de io malbona! Kiom da fojoj ankaŭ mi konscie aŭ nekonscie malpurigis per kotaj makuloj mian animon kaj la animojn de miaj proksimuloj!! Kiom da fojoj mi ĉagrenis ofendis, trompis ilin, sen peti pardonon! Ĉu mi efektive estas fiera, egoista, ŝtonokora aŭ orgojla?

Kaj denove mi rememoras la vortojn de la maljunulo: strebu havi grandan animon kaj ami la homojn...

Aŭtuno estas. La fruktoj maturiĝis, la abeloj plenigis la ĉelojn per dolĉa mielo, la sciuroj kolektis jam glanojn por la vintro. La naturo mal-avare elverŝis riĉaĵojn por ĉiuj.

Kaj vespere, enlitiĝinte, antaŭ ol ekdormi, mi demandas min: kion mi kreis hodiaŭ, kion utilan mi faris hodiaŭ por la homoj, ĉu mi gajnis novajn geamikojn aŭ pro iuj neprudentaj agoj oni ignoras aŭ forgesis jam min?

Aŭtuno estas, sezono de meditoj kaj rezonoj.

Sofio, en septembro 1972.

VÄSTERÅS AKTIVIĜAS

Såsom en direkt följd av den lyckade esperantoutställningen i biblioteket i Västerås i maj har nu åter en esperantoklubb sett dagens ljus i Västerås. Aktionsgruppen för Esperanto i Västerås har därmed nått sitt mål och bildar grundstommen i den nybildade klubben. I staden har tidigare en klubb startats år 1922 och en annan 1933, men omkring 1960 ebbade verksamheten ut. Den "nya" klubben, som kan betraktas som en pånyttfödelse av de tidigare, har i starten drygt tjugo medlemmar, av vilka ungefär hälften varit med i de tidigare klubbarna. Styrelsen består av Kaj Stridell, ordf., Wim Posthuma, sekr., Gunnar Farm, kassör och studieledare och övriga ledamöterna Chris Vos och Siri Bartusch. En nybörjarkurs i TBV under ledning av Gunnar Farm har ett dussintal deltagare.

Det andra månadmötet, i oktober, fick en speciell karaktär genom besök av Jean Guillaume, som mitt i Medelhavsmuseets vandringsutställning av forntida egyptisk konst föreläste om räddningen av de egyptiska monumenten. Klubben kommer i fortsättningen att träffas i sin lokal, Viksängsgatan 17, "ungefär" tredje måndagen i varje månad. Utöver vanlig mötesverksamhet skall man försöka genomföra vissa utåtriktade aktioner: Aktionsgruppens utställning lånas ut till andra klubbar och har redan visats i Motala, Vadstena, Skövde, Falköping, Norrköping och Linköping och är bokad för flera platser. Kopior av en del av affischerna på utställningen kommer att utbjudas till försäljning. Man skall sätta i system att låna alla de esperantoböcker som finns på biblioteket (i källaren!) för att på så vis åter få upp dem på särskild hylla i lånesalarna. Man planerar att organisera en "esperanto-bussresa" nästa sommar genom Europa.

Man vill gärna ha kontakt med andra klubbar, som har liknande planer för att utbyta erfarenheter till ömsesidig hjälp. Adress till sekr. Wim Posthuma är: Soldatgatan 40, 723 45 Västerås, tel. 021/13 35 29.

NÄR GAV DU DIG SJÄLV EN ESPERANTOBOK?

T. ex.

Tra lando de indianoj	inb. 35: 30	häft. 28: 25
Jaroj sur tero	inb. 18: 85	häft. 14: 15
Normandaj rakontoj	inb. 25: 90	
Islandaj pravocoj	inb. 11: 75	häft. 8: 85
Sipestro rakontas	inb. 11: 75	häft. 8: 85
Ekspedicio Kon-Tiki	inb. 29: 40	

eller efter önskan.


Beställ hos

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7
Postgiro 578-5

Moms är inräknad i dessa priser

25 år

A crumpled piece of paper, possibly a document or a letter, is shown in the lower half of the image. The paper is heavily wrinkled and folded, with the text printed on it appearing slightly distorted. The text is in a bold, sans-serif font and reads: "Deklarationen om de mänskliga rättigheterna".

**Deklarationen
om de mänskliga
rättigheterna**

Med anledning
av ett jubileum.
Esperantoförbundet

Antagen
den 10 december 1948.
Den 11 december 1948
glömd.

Det är i år 25 år sedan Deklarationen om de mänskliga rättigheterna antogs av FNs medlemsstater. Jubiléet kommer att firas. Men hur är det egentligen med deklarationen? Finns det någon som bryr sig om den?

Det gör man, i viss mån. Men den gäller inte alla. Den gäller inte om du råkar vara färgad i vissa stater, om du är kvinna, om du har en avvikande politisk eller religiös åskådning, om du är fattig eller arbetslös, om du tillhör en minoritet av något slag.

Man får varje dag bevis på att deklarationen inte är något mer än ett pappersdokument som dras fram vid högtidliga tillfällen för att glömmas bort fortast möjligt.

Vi tänker inte här ge en lista på länder där deklarationens principer inte följs — det finns knappast något land som inte skulle nödgas skylta med sitt namn på den. Även FN, den organisation som antog deklarationen, skulle vara med på den.

Vi reagerar idag häftigt mot ras- och könsdiskriminering. Även diskriminering på grund av etniskt ursprung, politisk eller religiös uppfattning känns kränkande. Detta gäller ännu mer för dem som är utsatta för diskrimineringen: i Indien, i Pakistan, i Sovjetunionen, i Nordirland, i Grekland, i Spanien, i Chile ...

Språket är en av människans intimaste ägodelar. Det sätter henne i kontakt med andra, ger henne samhörighetskänsla med alla som talar samma språk och delar hennes värderingar.

Det är genom språket som människan kan förverkliga sig själv, uttrycka sina tankar. Det är därför självklart, att rätten att använda sitt eget språk skyddas i Deklarationen om de mänskliga rättigheterna.

Hur ser verkligheten ut?

Rätten att använda sitt eget språk respekteras i alla stater som är enspråkiga. Så fort det finns flera språkgrupper inom landet är rätten urholkad till att gälla språkmajoriteten, eller den språkgrupp som är ekonomiskt och politiskt mäktigast.

Några folks kamp mot språkdiskriminering är känd för oss: flamländarna i Belgien, baskerna i Spanien, de fransktalande i Kanada... Andra folk får inte internationell uppmärksamhet, men vägrar att försvinna. Katalanerna i Spanien får bara läsa spanska. Katalanska tidningar och böcker tillåts inte utkomma. Slovenerna i södra Österrike vägar efter årtionden av förtryck och deporteringar nästan inte säga att de är slovenier. Friulaner, greker, albaner och andra i Italien "finns inte" och har följaktligen inga språkrättigheter. Och hur är det med de språkliga rättigheterna för miljontals invandrare?

Sådan är situationen t o m i länder som räknas som "demokratiska" och som i sin grundlag ger minoriteterna all tänkbar jämlikhet. I länder utanför Europa, där kolonialismen lämnat sina spår, är det ännu värre. I Afrika är oftast ett europeiskt språk undervisningsspråk — trots att ingen i landet har det språket som modersmål! I Latinamerika är spanska helt dominerande även i länder där majoriteten av befolkningen inte talar spanska. I Indien och Pakistan dödas människor i demonstrationer, när man försöker tvinga ett främmande språk på dem.

Undervisning kräver mycket tid, pengar och energi. Sker den på ett språk som är helt främmande för barnen får man inte heller vänta sig några resultat. Samtidigt som man i u-länderna försöker utbilda en elit i ett eller flera främmande språk, står människorna utan möjlighet till kontakt, därför att de få, som lär sig ett främmande språk, lär sig fel språk. Den som bor i en f d fransk koloni kan inte tala med grann-

landet som är en f d engelsk koloni eller en portugisisk koloni.

Även internationellt råder samma kaos. Där är det stormakterna som bestämmer och tvingar sina språk på andra. Det är deras språk som är tillåtna (i FN, t ex, kinesiska, engelska, ryska, spanska och franska). Det ger förstås

Språkjämlighet

- det är väl ingen viktig fråga?

folk som talar dessa språk fördelen att uttrycka sig fritt, medan alla andra måste använda sig av ett främmande språk så gott de kan.

Man tolkar mellan de tillåtna språken. Det innebär att många nyanser går förlorade och att missförstånd kan uppstå. Den viktiga direkta kontakten mellan människorna försvåras.

Men vanliga människor, som vill träffas och prata, kan inte skaffa tolk. Resultatet blir oftast att man bara kontaktar dem som talar samma språk som man själv, eller tiger.

Språket spelar en viktig roll i människornas liv. Språkjämlighet är en viktig fråga.

Vi i Esperantoförbundet tror inte på deklamationer. Vi tror mera på handlingar. Men vi kan inte förbigå detta jubileum utan att i några punkter ange den lösning som är den enda godtagbara:

Det finns en lösning. Låt oss ta det första steget.

- Vi vill slå fast, att jämlikhet måste råda mellan individer, nationaliteter och stater även i språkligt hänseende.
- Vi tillåter inte att främmande språk påtvingas oss eller något annat folk, därför avstår vi från att påtvinga andra vårt språk.
- Varje språk är ett tecken på nationell tillhörighet och en integrerad del av ett folks egenart. Därför bör det respekteras.
- Inget språk bör få fördelar i kontakter mellan stater och nationaliteter, därför att det uppstår ny social, kulturell, ekonomisk och politisk ojämlikhet ur sådana fördelar.
- Språkproblemen bör man lösa på samma sätt mellan alla språkgrupper. Samma principer bör gälla såväl mellan stora och små staters språk som mellan de olika språkgrupperna inom en flerspråkig stat.
- De sätt på vilka man hittills har försökt lösa språkproblemet (med tolkar och tolkanläggningar) har inte lett till ett tillfredsställande resultat. Lösningen har kunnat användas bara av en elit, inte av flertalet människor.

Vi föreslår därför att man accepterar en lösning enligt följande principer:

- 1 Alla avstår principiellt från att använda sitt eget språk i kontakter med andra folk.
- 2 Det internationella språket esperanto blir det andra språket för alla, det gemensamma språket för internationellt bruk och ett tecken på samhörighet med en bredare mänsklig gemenskap.

Esperantoförbundet
Fack
122 04 Stockholm-Enskede

Pasporta servo

de TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Multaj homoj el ĉiuj aĝoj havas loĝejon iomete pli grandan ol sufiĉas por ili, kaj ŝatas ekhavi novajn amikojn kaj helpi al homfratoj. Multaj aliaj homoj — kutime junaj — ŝatas vojaĝi, deziras konatiĝi kun enloĝantoj de vizitataj regionoj, kaj disponas pri malmulta mono. Se tiuj homoj hazarde parolas saman lingvon — ekz. esperanton — tre facile povas okazi gastigo kiu kontentigos ambaŭ.

Por faciligi tiajn gastigojn PASPORTA SERVO de TEJO estas reorganizita sur jenaj bazoj:

1. Pasporta servo estas neprofitcela servo disponigita al tiuj, kiuj pagas aliĝkotizon tiucele.
2. Kvankam ĝi funkcias en kadro de TEJO la servo devas esti finance memstara.
3. La servo publikigas ĉiujare broŝuron kiu enhavas listojn de gastigant-adresoj. La broŝuro estas disdonita kontraŭ aliĝpago.
4. La gastigofertoj registritaj laŭ geografia ordo en la broŝuro devas enteni jenajn informojn:
 - kio disponeblas: lito aŭ ĉambro
 - nomo kaj adreso kompletaj (kun mencio pri kiom for de la plej proksima granda urbo)
 - maksimuma periodo de gastado
 - maksimuma nombro de samtempaj gastoj
 - postulata aĝlimo de gastoj (eventuale)
 - periodo kiam la oferto validas.
5. La gastigpetanto mem ekkontaktas la koncernan personon ĉe kiu li ŝatus gasti kaj faras kun li la necesajn interkonsentojn pri la karakterizo de la gastado (daŭro, komforto, eventualaj repagoj por manĝoj, ktp).
6. La servo ne povas respondi pri:
 - a) eventuala nekoincido inter la publikigitaj informoj kaj la efektiva plenumo de la gastado
 - b) problemoj okazantaj se la gastigpetanto alvenas surloke sen antaŭe kontakti la ofertanton, aŭ antaŭ ol ricevi de la ofertanto konfirman respondon pri la gastigo.

La broŝuro estos eldonita jam fine de decembro, kaj tiam havebla kontraŭ aliĝkotizo de 5 francaj frankoj, aŭ 6 internaciaj respondkuponoj.

Rabato: por tiuj kiuj aliĝos antaŭ la 30a de novembro 73, kotizo estas nur 4 FF aŭ 5 int. rpk.

Ĝis la fino de novembro la servo kolektos adresojn de gastigontoj. Jam nun sendu la necesajn informojn al la supra adreso, kaj demandu al viaj amikoj, ĉu ankaŭ ili ne ŝatus gastigi esperantistojn...

Samtempe mendu la broŝuron por ĝui la rabaton!

Informas SEF, Stokholmo.

La ora pola aŭtuno



Balo de "cifonuloj".

LA 9-A INTERNACIA ESPERANTISTA FERIADO "La Ora Pola Aŭtuno"

16—29 sept. 1973 en Miedzygorze

En la invitilo ni legis ke "Ĉefa celo de la Feriado estas praktiki la internacian lingvon en gaja kaj amika medio". Jes dum du semajnoj oni disponas sufiĉe da tempo por praktiki la lingvon kaj konatiĝi kun aliaj partoprenantoj. La sekvo estis ke oni havigis al si multajn novajn sed ne malpli karajn geamikojn. Kontentiga nombro da gejunuloj partoprenis la arangon kaj kiel ofte oni konatiĝis kun pluraj kouencantoj kiuj dum la unuaj tagoj uzis la lingvon.

Partoprenis ĉirkaŭ 300 gesamideanoj



Dum Internacia Vespere Erna Johansson, reprezentantino de la sveda grupo, prezentis poemon el Sveda Poemaro, "BONVENSALUTO" de Vera Flygare.

el 12 nacioj kaj inter ili oni retrovis svedan grupeton, kvin gesamideanoj el Klubo Esperantista de Skövde.

Miedzygorze estas ĉarme kvieta ripozloko en la intermonta valo de la Wilczka-rivero en Klodzko-regiono (Sudety montaro). La loko situas 680 m super la marnivelo kun tute pura aero, longe for de fabrikoj kaj similaj aer-malpurigantoj.

La granda ripozdomo "Gigant", konstruita en alpa stilo, estis nia "internacia hejmo" dum la du semajnoj.

La organizantoj de la Feriado preparis ampleksan kaj kulturen kaj distran programon: Kursoj, ekskursoj, promenadoj, prelegoj, div. distraj prezentadoj en esperanto, koncertoj, balo de "ĉifonuloj" k. t. p. Ĉi tie ni ne intencas doni tutan raporton pri la Feriado, ni nur volas mencii ke ni partoprenis kaj ke ni estas pli ol kontentaj. Kun dubo ni legis en la invitilo ke "La Ora Pola Aŭtuno" farigis unu el la plej popularaj esperantistaj arangoj en la mondo. Tiu nia dubo rapide forflugis en Miedzygorze. Jam nun oni povas aliĝi al la venontjara arango, al LA 10-A JUBILEA INTERNACIA ESPERANTISTA FERIADO. Peton pri aliĝilo oni sendu al la adreso: Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL 50-952 WROCLAW 17, Pollando.

L. W.

Esperanto nytt

Du vet väl om att vi sedan åtskilliga år har ett svenskspråkigt informationsorgan, Esperantonytt?

Det kommer ut med fyra A 5-sidor fyra gånger per år, och är framför allt avsett att ge en koncentrad information om esperanto och vad som händer i esperantovärlden till utomstående, som inte har tid att läsa långa artiklar. Den är faktiskt ypperlig att sända till politiker på alla nivåer, skolfolk, journalister, fackföreningsmän, företagsledning etc. Utförandet är mycket tilltalande, och stilen är modern och ledig.

Priset är mycket lågt: 2 kronor för 4 nummer eller 10 exemplar. Sänd en lista på personer på din ort som du tycker bör informeras om esperanto och betala avgifter, så får de regelbundet Esperantonytt. Och prenumerera gärna dessutom på några exemplar att själv ha till hands. Detta är ett billigt och bekvämt sätt för var och en att hjälpa till att sprida kännedom om vårt språk — vi har ju flera gånger konstaterat att vad vi framförallt behöver är just information utåt!

Redaktör: Sten Öfors, Voxnegrand 24, 121 60 Johanneshov. Postgiro 20 65 88-6.

Prelego

Kelkaj konsiloj.

Pri la temo vi ne multe zorgu, ĉar tiu afero ne estas la plej grava. Kio? Ĉu vi estas freneza?? La plej grava estas ke vi rapide finas vian oratoran ekzercadon. Kial??

Sciu, ke la societo kiu aŭdas vin konsistas el tri kategorioj. Unue, homoj kiuj ne kutimas aŭskulti, por ili via strebado estas tute vana, ili vivas (restas) en la lando "Babila" kaj nur volas aŭdigi siajn pli aŭ malpli belajn voĉojn.

Due, aliaj estas lacaj post sia laboro kaj tuj ekdormas. Ne tondru por vekigi ilin, ĉar kvaronhora dormo aŭ pli estas tre refreŝiga afero. Trie, granda grupo opinias ke vi parolas tro rapide, ĉu ili komprenus vin se vi parolus malrapide? Tute ne. Dankon!

Duro

Esperantoförbundet är en riksorganisation med huvudkontor i Stockholm och filialkontor i bl. a. Malmö, Lidköping, Göteborg, Norrköping och Uppsala. Organisationen har många internationella kontakter. Till vår expanderande verksamhet söker vi flera nya medarbetare.

1. Översättare

Det händer, att vi behöver snabbt få fram översättningar av viktiga dokument om esperanto. Ibland kan det vara fråga om något längre saker som kan ta lite tid. Oftast är det fråga om översättningar från esperanto, men även andra språk kan vara aktuella. Vi vill gärna veta vilka som är villiga att, någon gång, åta sig översättningsuppdrag.

Arbetsort: decentraliserad. Arbetet kan med fördel bedrivas hemma när barnen har lagt sig.

2. Adresserare

Vi adresserar själva Esperantonytt, kuvert till La Espero och Klubbinfo, medlemskort och annat. Dvs. Bertil Åkerberg gör det. Finns det någon som vill hjälpa Bertil med det? Det är inte varje dag han behöver hjälp, bara några gånger per år, när det kör ihop sig.

Arbetsort: Stockholm, eftersom adresseringsmaskinen står i Bertils källare.

3. Redaktionsmedhjälpare

Vi ger ut två tidningar: La Espero och Esperantonytt. Redaktörerna till båda vill gärna veta vilka av medlemmarna som skulle vara villiga att hjälpa till och skriva i tidningarna regelbundet. Ring till dem och prata om det.

Arbetsort: decentraliserad. Arbetet kan skötas t. o. m. från utlandet.

4. Maskinskrivare

Det är mycket som behöver skrivas ut på maskin. Och vi räknar med att få mer att skriva i fortsättningen. Om du kan skriva snabbt och rent, på papper eller på stencil, anmäl ditt intresse NU. Det är inget brådsakande arbete som ligger just nu, men man vet aldrig...

Arbetsort: decentraliserad, men gärna i Stockholm.

5. Expeditorer

På denna post behöver vi hjälp med detsamma. Sekretariatet är öppet en gång i veckan, på onsdagar. Då ska man svara i telefon, sortera posten, expediera beställningar från klubbar och intresserade o. s. v. I och med att vår verksamhet ökar, ökar även belastningen på sekretariatet. Vi behöver hjälp från några som åtar sig att en gång (eller flera gånger) per månad hjälpa till med detta. Trevliga arbetslokaler och god kamratanda.

Arbetsort: Stockholm, SEF:s sekretariat, Högervägen 31 i Enskede.

Lön: Vi tillämpar likalönsprincipen. Alla, från VD till hisspojken, får samma årslön: ett tack då och då.

Om du vill hjälpa till, ring en onsdag kväll (kl. 18—20) till tel. 08 - 48 99 76 eller skriv några rader till Esperantoförbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede. Vi lovar att beakta din "arbetsansökan" välvilligt.

Esperantoförbundet

Sorto de peticio

S-ro Jean Guillaume dum sia veturo tra Svedujo legis nian artikolon pri la peticio en nro 4/1973 kaj estas ĉagrenita, ĉar ni tie ne mencias la nomon de **Ernfrid Malmgren**. En sia letero al ni s-ro Guillaume donas ekzemplojn pri la sinifero de Ernfrid Malmgren, tiam jam grave suferanta de sia malsano, kiam li persone veturis al Parizo por provi influi al la delegacioj ĉe Unesco.

Ni tre alte taksas la respekton kiun s-ro Guillaume montras al sia forpasinta amiko. Ĉiu sveda esperantisto iom informita pri la afero admiras la grandegan laboron de Ernfrid Malmgren, kiu fariĝis lia lasta granda servo al nia movado. Sed s-ro Guillaume miskomprenis la intencon de la artikolo.

Ni mencias nur la nomojn de s-ro Dahl kaj s-ro Mellqvist, ĉar tiuj du en la sveda parlamento respondecis por la propono, kaj ni volis informi, ne pri kiuj laboris por la propono, sed pri ĝia efektiva sorto.

Ni volis montri, ke la sveda registaro siaflanke efektive ne neglektis la proponon, ke la ministro de edukado serioze respondis la demandon kio okazis pri ĝi kaj ke la koncerna parlamentano kiu akceptis la respondon trovis okazon fari en la parlamento pozitivan eldiron pri esperanto.

La redaktoro

El Huskvarna

En gimnazio en Huskvarna oni dediĉis t. n. "duonan koncentrigotagon" al esperanto. Enkondukis la iniciatinto, gimnazia instruisto Rolf Nordström, kiu prezentis la mondan lingvoproblemon kaj esperanton. Sekvis prelego de Justin Minani el Burundo, kiun interpretis Lennart Åberg.

Ceestis ja jarkurso 2:3 kaj ankaŭ aliaj gelernantoj, kiuj havis eblecon partopreni. La arango vekis grandan intereson kaj aperis artikoloj en Jönköpings-Posten.

15 lernantoj aliĝis al vespera kurso, kiun gvidas Rolf Nordström. La lernejo helpas ekonomie tiel, ke ĝi pagas la kurslibrojn, kiujn la kursanoj povas aŭ prunti aŭ aĉeti je reduktita prezo.

ITALUJO KAJ AŬSTRUJO KOMUNE REVERKOS SIAJN LERNOLIBROJN PRI HISTORIO

La italaj lernolibroj donos de nun pli da spaco al la faroj de imperiestro Maximilian la Unua kaj de la Imperiestrino Marie-Thérèse de Aŭstrujo, dum la aŭstraj lernolibroj pritraktos ne nur la arton kaj kulturon de la itala renesanco sed egale politikajn aspektojn.

Jen du ekzemploj, elektitaj el la longa listo de rekomendoj, kiujn oni lastatempe akceptis en Vieno ĉe ko-

misiono de 13 historiistoj kaj profesoroj el universitatoj italaj kaj aŭstraj.

— Mia edzo kaj mi kverelas konstante unu fojon ĝiusemajne. Ĉu ne ankaŭ vi faras la saman kun via edzo, sinjorino Brovo?

— Ne, mia edzo havas monatan salajron.

★

62: — Mi volas fariĝi majoro.

La furiero — Ĉu vi estas freneza, viro?

62: — Ne, ĉu oni devas esti tio?

Om du vill ha en årsbok med

- adresser till delegater och fackdelegater i hela världen
- boklista med alla esperantoböcker som kan köpas (och beställas hos Esperantoförbundet, Fack, 200 42 Malmö 7)
- esperantoförbundet i andra länder
- tidskrifter
- våglängder för radiosändningar på esperanto
- och mycket, mycket annat

Om du regelbundet vill läsa i Revuo Esperanto om

- viktiga händelser i esperantovärlden
- recensioner
- artiklar av ledande esperantister i olika länder
- småannonser
- många intressanta notiser

Om du vill

- ha stor rabatt på kongressavgifterna vid världskongresser

Då ska du bli medlem i UEA Sänd kr. 60:- till pg. 14 74 29-5

- Det är alltså 1974 års medlemsavgift, som du nu i god tid betalar. Alltså kr. 60: — till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Malmö. Skriv MA på talongen.
- Det finns många, som vill räcka UEA en hjälpande hand och betala en stödjande avgift. Ändra då till kr. 90: — och skriv MS på talongen. Du får både årsbok och tidning. Tack på förhand från UEA.

UEA har följande kategorier:

- MA se ovan
- MS se ovan
- JMA kr. 45: —
Ungdomsmedlem under 22 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- MAK kr. 60: —
Ungdomsmedlem 22—25 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- MJM kr. 15: —
Ungdomsmedlem under 22 år med endast årsbok
- MJ kr. 30: —
Medlem med endast årsbok
- DM kr. 1.200: —
"Dumviva medlem", betalar 20 MA-avgifter och är sedan ständigt UEA-medlem

Svenska Esperantoförbundet

MILITA NOVELO

de CAPRICORNUS

Ekbruis la porda sonorilo. Mi estis sufiĉe okupata kaj maleme formetis mian laboron por malfermi la pordon. Atendis min tie konato, bedaŭrinde tiu fripono Plyting. Terure, ĉu mi devos nun paroli kun li dum la tuta vespero anstataŭ finigi gravan laboron. Jam la postan matenon mi devus sendi promesitan novelon al gazeto. Mi sentis min kiel erinaco turnita ekstero-internen.

Per helpo de forta volo kaj aktora talento mi tamen sukcesis montri al li gajan vizaĝon: Hej amiko, longe mi ne vidis vin, kiel vi fartas, bonvolu eniri ktp. Mi antaŭvidis tedan vesperon.

— Dankon, li diris, hazarde mi preterpasis kaj pensis ke estus agrable baili kun vi kelkajn minutojn ktp.

Mi dentogrincis interne, silente, kaj ekvidis timigan vizion: blanka, malplena poŝkesto, nenia pago. Kion mi faru? Mi estas tro ĝentila, ne povas forigi lin, kaj نکته mi ne povas labori. Freneze mi pripensis diversajn eblecojn kaj malojn dum mi ŝajne glate kaj volonte konversaciis.

Subite frapis min bona ideo. Mia amiko estis maniulo, kaj ĉiu maniulo en certa maniero ne povas kontroli sin mem. Nur menciu la temon de lia manio kaj jen vi povos kion ajn fari dum li elverŝas sian tutan vortprovizion pri sia amata afero.

— Nu, mi sukcese intervenis, ĉu vi hazarde konas tiun certan epizodon el la dua punika milito...

— Ha certe! li tuj ekkriis, kaj jam torentis ĉirkaŭ miaj oreloj rivero de historiaj detaloj, kronologio, statistiko, tipo de ŝuoj de simpla soldato, kolora varieco de la kapitana kaskotuo ktp. Bone funkcias! mi pensis, prenis mian notfoliaron kaj tuj ekskribis.

— Pardonon, mi diris, tre interese tion-ĉi, nepre mi devas iom noti. Ĉu vi bonvolus ripeti la nomon de tiu lama, nubia centestro por ke mi havu korektan ortografion. Aha, Ben Muides, bone, dankon.

Kaj dum marŝis legioj tien kaj reen, henis ĉevaloj, brudis ĉaroj, dum pasis historia epoko kaj grandioze pentris sin grandskala milita scenejo, mi skribadis. La raspadon de mia skribilo akompanis kriadon de vunditoj, virina ploro, ebria triumfo de strategistoj, obtuza trumpetado de militelefantoj... Dume mi skribadis penante ne distriĝi pro kriza epizodo, verve vigligita per rakonta entuziasmo de mia amiko. Speciale mi devis mobilizi intencan koncentrigon kiam li kun laŭta voĉo kaj riska gestado redonis memorindan okazon kiam Hannibal spite al ĝena dentodoloro mem rebatis malamikan atakon. Iam time mi rigardis al mia vitrokristala pendolampo. Trafo de lia brako estus katastrofa...

Jen, fakte jam pretas duono de la novelo, kaj mi scias, tiu milito estas longedaŭra afero, certe mi sukcesos finigi mian laboron antaŭ ol Hannibal alvenos al Romo. Fluadas

la parolo. Uŝ terure, ĝi miksiĝas en tede komplikan situacion de la periferia, tiutempa politiko! Senspira vortomaĉado! Tio vere fariĝas jam iom laciga, sed mi ja mem provokis la aferon kaj devas nun ĝisfinc suferi ĝin.

Iom malrapida ĝi estas, tiu-ĉi metodo, tamen la afero progresas, nur du-tri paĝojn ankoraŭ, poste mi elpensos konvenan finon por mia noveleto. Se mi nur ankaŭ sukcesos poste silentigi mian punikan specialiston, ĉu mi ne havas ian kredindan pretekston por rapide veni en mian litojn? Kara lito, ĝuste nun vi estas mia plej ŝatata amiko. Mi scias, vi karese bonvenigas mian lacan korpon, ha, kiel agrable estos! Vere mi devus baldaŭ enlitiĝi, necesos ja morgaŭ frue komenci por maŝinskribi tion-ĉi.

Fakte mi estis iom nervoza, ĉu ne estas jam sufiĉe malfrue, mi pensis, li devus ja foriri tuj, ĉar nun mi ja preskaŭ pretas. Ne nur nervoza mi estis, eĉ mi ankaŭ ĉagrenis. Baldaŭ mi ne tute kontrolos min, ĉu ne iu leĝa paragrafo malpermesas tian noktan intrudon? Ĉu mi povus eble telefoni kaj ŝajne aranĝi ian...


Jen signalo! Ĉu tiel akurate efikas mia nura penso!

— Halo? Jes. Aha, nu, kompreneble. Tre malfacila nun jes malfacila situacio por vi jes. Tuj mi iros malfermi por vi la eksteran pordon. Post tri minutoj... Bone, jes.

Pro Mefisto, kia bonsanco! Iu ruplis malgustan numeron, hazarde la mian kaj tuj malkonektis. Al mia amiko mi deklaris ke mia onklo estis perdinta sian loĝejan ŝlosilon kaj venos nun tranokti ĉe mi. — Bedaŭrinde, mi diris, ni devos do finigi nian interesan historian ekskurson al pasinta jarmilo...

Mi iris malfermi la pordon, kaj mia amiko malaperis tra ĝi. Tute feliĉa mi regrimpis la ŝtuparon al rendezuol kun mia kara lito. Kaj vi demandas, kara leganto ĉu eblas produkti novelon en tia malfavora situacio. Do, juĝu mem — vi ĵus legis ĝin!

Det har klingat i vår kassa.



Många har tyckt att Esperantoförbundets planer på en informationskampanj till skolor, en ny lärobok, nytt informationsmaterial m. m. är värda lite stöd i pengar också. Det har klingat i vår kassa som det inte gör så ofta. Vi tackar alla som har lämnat ett bidrag.

Om du hade tänkt bidra, men glömt bort det, så är du också välkommen.

Esperantoförbundet, Informationskonto, pg 66 41 50-0.

Veteranoj forpasis

CURT ALDSTEN

mortis la 7-an de oktobro. Li naskiĝis en 1908. Ano de la Esp. Klubo en Karlskrona, kaj de SEF kaj UEA.

Li vizitis plurajn Esp.kongresojn kaj havis korespondajn amikojn en tuta mondo. Prezidanto de la klubo dum 21 jaroj. Ni kun danko memoras lin.

Helge Hultgren

RUBEN ANDERSSON

Nia smolanda samideano **Ruben Andersson**, mortis en sia 83-a jaro. Dum 30 jaroj li agadis en Tranås kiel popollerneja instruisto, prezidanto de la Prelega Asocio kaj energia gvidanto de la Esperanto-vivo. Li ripozu pace!

T. M.

Eksperimento Franca-svisa pri integrigita instruo —

INSTIGILO AL EUROPSKALA KUNLABORO

Pro iniciato de la Monda Sanorganizaĵo la Universitatoj de Genevo kaj de Parizo-V (René Descartes) ĵus kreis komunan diplomon de homa ekologio kaj de antropologio. Ĉi tiun eksperimenton pri integrigita instruo, kiu implicas identecon de programoj kaj de regulan interŝanĝon de profesoroj, oni pliampleksigos ekde la monato oktobro al la Universitatoj de Toulouse III (Paul Sabatier) kaj de Torino; poste, en 1973—74, al certa

UNESKO INFORMAS

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

ARGENTINA PREMIO POR BLINDAJ ESEISTOJ

Presisto de brajlaj libroj en Buenos Aires organizas eseokonkurson, en kiu blinduloj de ĉiuj landoj povas partopreni, por celebri la Internacian Jaron de la Libro.

Oni proponas tri premiojn de 3 000, 1 500 kaj 1 000 pesoj (§ 312, § 156 kaj § 104) por la plej bonaj eseoj pri la libro en ĝiaj aspektoj rilate al tiaj temoj ,kiaj historio, kulturo, eduko, scienco, estetiko.

La eseoj povas esti el 3 000 ĝis 5 000 vortoj kaj devas esti submetitaj ĝis la 31 decembro 1972. Oni povas akiri detalojn de la konkursaj reguloj de Editora Nacional Braille, Hipolito Yrigoyen, 2850, Buenos Aires, Argentino.

BRAZILU VARBAS GEJUNULOJN POR DISVASTIGI LEGKAPABLON

Brazilo permesos al 2 500 000 junaj brazilanoj en la aĝo de deviga militista servo plenumi sian servodevon venontjare partoprenante en kampanjo kontraŭ analfabeteco "MOBRAL" (Movimento Brasileiro de Alfabetização).

Preskaŭ la duono el ili estos virinoj kaj pastroj, kiuj laŭ la konstitucio estas liberaj de militistaj devoj dum tempo de paco, sed "restas devig-

nombro de aliaj altgradaj instruejoj.

Kontrolata per unu sola ekzamenanto antaŭ komunaj ĵurioj, ĉi tiu dujara kurso temos pri analizo de la medio, interagadoj interne de homaj logantaroj en nova medio, kaj la maniero gvidi ties evoluon. La kurso celas kuracistojn, urbistojn, sindikatisojn, industriistojn, sociologojn k.t.p.

cblaj por aliaj taskoj, kiujn povos ordoni la leĝo".

Laŭ informisto de la armeo, la plano inkluzivas ĉiujn gejunulojn de servoaĝo, aŭ kiel lernantojn aŭ kiel instruistojn. Gejunulojn, kiujn ĉe la registriĝo oni trovas analfabetoj, oni tuj sendos al la posteno de MOBRAL plej proksima al ilia regimento. Tiuj, kiuj nedevice estos armeanoj, devos ĉeesti kursojn de MOBRAL dum 11 monatoj, t. e. la norma periodo de armea servo. Ili povos daŭrigi siajn civilajn okupojn, sed devos apartigi horojn por la kursoj.

UNIVERSITATO DE UN PLI PROKSIMA AL REALIGO

La establo de Universitato de UN pliproksimiĝas al realigo pro kunveno en Parizo en junio. Projekto de ĉarto estis pretigita kaj oni prezentos ĝin al la Generala Asembleo de UN malpli frue en la jaro.

Malsame kiel aliaj Universitatoj, ĝi ne staros unuloke sed ĝin konstituos reto da centroj por studo kaj eduko en diversaj landoj, evoluigintaj kaj evoluigantaj. La studentoj kaj la profesoroj estos multnaciaj, kaj la fokuso de la studoj estos sur la gravaj problemoj de homa vivo kaj progreso.

BREVMÄRKE HAMBURG

Hjälp till att göra reklam för världskongressen i Hamburg genom att på all post sätta kongressens brevmarke. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:50

3 kartor kr. 3:25

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto, Malmö).

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Anmäl dig till världskon-gressen nu

Hamburg 1974

Som bekant har HAMBURG fått i uppdrag att nästa år under tiden 27 juli—3 augusti ordna Esperanto-världskon-gressen.

Svensk förmedlare (peranto) är som vanligt endast Svenska Esperantoförbundet. Anmälningblanketter kan du beställa hos fru Ester André, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040-652 09). Till samma adress återsänder du anmälningblanketten. Även utfärder och logi beställas hos fru André, när det sedan blir tid för det, men vänta då alltid på SEF:s cirkulär, som kommer till alla an-mälda.

Alla avgifter betalar du till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, specialkonto, Malmö.

Nu gäller det kongressavgiften och den bör du ordna omgående.

Kongressavgifterna är lägre för den som är direkt medlem i UEA och för den som anmäler sig tidigt. Här nedan följer kongressavgifterna enl. de olika kategorierna. Den första av-giften gäller den som anmäler sig se-nast den 31 december i år (inom pa-rentes meddelas avgiften intill 31 mars 1974, varefter den stiger ytterli-gare).

1. Kongresano, ne-membro individua de UEA: **167:** — (185: —)
2. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ): **143:** — (159: —)
3. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA): **117:** — (134: —)
4. Edz(in) o de Kongresano en kate-gorio 1: **118:** — (130: —)
5. Edz(in) o de Kongresano en kate-gorioj 2 aŭ 3: **101:** — (112: —)
6. Junul(in) o ĝis inkl. 20: jara: **50:** — (56: —).
7. Universitata student(in) o ĝis inkl. 30jara: **85:** — (93: —).
8. Blindul(in) o: **67:** — (73: —).
Allt i svenska kronor.

När du anmäler dig, skriv tydligt ditt namn och adress, men sätt inte ut några anmälningavgifter. Det gör SEF. Meddela i stället avgifterna tydligt på postgirotalongen eller helst i ett särskilt brev tillsammans med an-mälningblanketten.

KOREKTADO — Estraro

La adreso de **Tomas Jansson** estas Granitvägen 8 B (ne 83), 752 43 Upp-sala.

Ere — parkere

1. Altan arbon batas la fulmo.
2. Kiu mem sin gloras, malbone cdo-ras.
3. Ne ĉio utilas, kio brilas.
4. Ne ekzistas fumo sen brulo.

AUTOBUSVOJAGO TRA NORDA EŬROPO — IO POR LA GEJUNULOJ?

Skribas Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås; tel. hejma 021/13 35 29, laboreja 021/10 00 00/1957:

Ni planas esperantan aŭtobusvoja-gon tra (Norda) Eŭropo sekvontan someron kun (junaj) esperantistoj el Skandinavio. La ideo estas, ke la kurspartopreninto finu sian studadon per tia veturo, tiel ke li komprenu, ke la esperantomondo ne estas tiel limigita kaj ke li poste mem povu veturi laŭ propra iniciato. Ofte ni ja kontentigas per tio, ke ni arangas kurson, sed ni ne atentis, ĉu la partoprenantoj havas utilon de la scioj aŭ ne. Ni planas viziti esperantoka-fejon en Szczecin, la esperantomuzeon en Vieno, la centran oficejon de UEA en Rotterdam kaj pasigi unu tagon je la UK en Hamburgo. Ni dormos en junulargastejoj, tiel ke ankaŭ neesperantistoj konstatu, ke esperanto daŭre vivas. Ni bonvenigas anaaŭ infanojn se la gepatroj kunveturas.

UNGA KURSDELTAGARE, SE HIT!

Wim Posthuma (adress, se ovan) meddelar i ovanstående artikel att han och medhjälpare planerar en bussresa genom Europa sommaren 1974 för — speciellt yngre — deltagare i esperantokurser. Man skall besöka ett esperantokafé i f. d. Stettin, esperantomuséet i Wien och tillbringa någon dag vid världsesperantokongressen i Hamburg. Du behöver inte vara någon "stjärna" vad esperantokunskaperna beträffar!

Varför inte komma med?

**JULKLAPPSTID -
BOKKÖPSTID!**
ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö 7
Postgiro 578-5
skaffar allt i
ESPERANTO-LEKTYR.
Välj i UEA:s årsbok!

Lasta dato por manuskriptoj por la sekvonta numero de La Espero: 31 decembro.

Zamenhof - broŝuro serĉata

En Majo de 1897 L. Zamenhof dis-sendis 6.000 broŝurojn "Elektro de internacia lingvo" en angla, franca, germana, rusa lingvoj. Vidu libron "Originala verkaro de L. Zamenhof", p. 221. Urĝe mi bezonas kseros kopion de menciita broŝuro en angla lingvo. Se vi posedas ĝin, volu sendi al mi per aerpoŝto kseros kopion de broŝuro "Elektro de internacia lingvo" en angla lingvo kune kun fakturo. Por plenumo de mia peto anticipe mi dankas vin.

Adolf Holzhaus
2748 Orchard Lane
Columbus, Indiana
U. S. A. 47201

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO
ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7
Ejo: Möllervångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkredo 10.00—11.00
ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Ströme
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkers-gatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1973